

Wilhelm Müller,
La tilio
tradukita de Ludwig Emil Meier

Ĉe l'puto antaŭ l'urbo
 Jen staras la tili',
 En kies ombro dolĉe
 Revadis ofte mi.
 En ĝia ŝel' tranĉite
 Vidiĝas ama dir',
 Kaj daŭre min altiras
 Al ĝi la korsopir'.

Hodiaŭ, ĉe noktmezo
 Mi pasis ĝin, migrul',
 Ho! Spite la malhelo
 Fermiĝis la okul'.
 Sed ĝiaj bonaj branĉoj
 Alvokis ŝajne min:
 "Alvenu, ho junulo,
 Ni repacigos vin!"

Alblovis vent' malvarme
 Kun granda energi',
 Ĉapelon ĝi fortiris,
 sed ne turniĝis mi.
 Kaj nun, post kelka mejlo
 De interspaco, ho!
 Ankoraŭ bruas l'arbo.
 "Ĉe mi pacigu do!"

*Traduko de la Germana poemeto "Der Lindenbaum" de WILHELM MÜLLER (*1794-10-07 – †1827-10-01) en Esperanton de LUDWIG EMIL MEIER (*1847-02-16 – †1919) en 1907.*

Arg-83-166 (2014-05-31 14:26:54)

Tio estas la origina tradukversio de L. E. MEIER. Ĝi troviĝas en la kantlibreto "Esperantista Kantaro", kiun eldonis HANS TH. HOFFMANN en 1907 en sia eldonejo en Berlin, Steglitzer Str. 44. Tiu ĉi esperantigo troviĝas ankaŭ en http://kantaro.ikso.net/la_tilio. Vidu ankaŭ: <http://194.95.59.225/index.php?id=3623>.

Wilhelm Müller,
Der Lindenbaum

Am Brunnen vor dem Tore
 Da steht ein Lindenbaum
 Ich träumt in seinem Schatten
 So manchen süßen Traum
 Ich schnitt in seine Rinde
 so manches liebes Wort
 Es zog in Freud und Leide
 Zu ihm mich immer fort

Ich mußt auch heute wandern
 Vorbei in tiefer Nacht
 Da hab ich noch im Dunkel
 Die Augen zugemacht
 Und seine Zweige rauschten
 Als riefen sie mir zu:
 "Komm her zu mir, Geselle
 Hier findst du deine Ruh."

Die kalten Winde bliesen
 Mir grad ins Angesicht
 Der Hut flog mir vom Kopfe
 Ich wendete mich nicht
 Nun bin ich manche Stunde
 Entfernt von diesem Ort
 Und immer hör ich's rauschen:
 "Du fändest Ruhe dort."

*Verkinto de tiu ĉi Germana poemeto estas WILHELM MÜLLER (*1794-10-07 – †1827-10-01), publikigita 1822.*

Arg-83-163 (2003-12-28 22:57:42)

Mi trovis tiun originan version en la TTT sub <http://ingebo.org/Lieder/AmBrunne.html>